

Ĉirkaŭ *Pola Radio* (kursmaterialo por progresantoj)

2. BABELO – NI REVENU AL LA FONTO

1 Sur la tuta tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero. 2 Kaj kiam ili ekiris de la oriento, ili trovis valon en la lando Ŝinar kaj tie ekloĝis. 3 Kaj ili diris unu al alia: Venu, ni faru brikojn kaj ni brulpretigu ilin per fajro. Kaj la brikoj fariĝis por ili ŝtonoj, kaj la bitumo fariĝis por ili kalko. 4 Kaj ili diris: Venu, ni konstruu al ni urbon, kaj turon, kies supro atingos la ĉielon, kaj ni akiru al ni gloron, antaŭ ol ni disiĝos sur la supraĵo de la tuta tero. 5 Kaj la Eternulo malleviĝis, por vidi la urbon kaj la turon, kiujn konstruis la homidoj. 6 Kaj la Eternulo diris: Jen estas unu popolo, kaj unu lingvon ili ĉiuj havas; kaj jen, kion ili komencis fari, kaj ili ne estos malhelpataj en ĉio, kion ili decidis fari. 7 Ni malleviĝu do, kaj Ni konfuzu tie ilian lingvon, por ke unu ne komprenu la parolon de alia. 8 Kaj la Eternulo disigis ilin de tie sur la supraĵon de la tuta tero, kaj ili ĉesis konstrui la urbon. 9 Tial oni donis al ĝi la nomon Babel, ĉar tie la Eternulo konfuzis la lingvon de la tuta tero kaj de tie la Eternulo disigis ilin sur la supraĵon de la tuta tero.

(El la Biblio, Gen. 11)

Demandoj pri la teksto

1. « Ili ekiris de la oriento » : pri kiuj temas ? (Se vi ne scias, legu la finon de la antaŭa ĉapitro de Genezo. Rete: a) http://home.att.net/~el_sxadaj/kbiblio.htm; b) <http://217.215.67.169/biblio/>)
2. Serĉu en PIV la difinojn de terminoj *bitumo* kaj *kalko*. Provu kompreni la distingajn trajtojn inter *bitumo*, *gudro*, *asfalto*, *makadamo*, *petrolo* kaj *nafto*.
3. Klarigu : « la brikoj fariĝis por ili ŝtonoj, kaj la bitumo fariĝis por ili kalko ». Kio estas subkomprenebla en tiu ĉi malgranda frazo ?
4. Kiel vi komprenas « ni akiru al ni gloron, antaŭ ol ni disiĝos » ? En alilingvaj tradukoj oni trovas « por ke ni ne disiĝu » aŭ « timante ke ni disiĝus » (en la hebrea : פֶּנְנָפֶּן (*pen nafuc*)). Ĉu la signifoj samas ?
5. Ĉu la teksto klarigas la motivojn de la Eternulo ? Kiuj ili estas laŭ vi ?
6. Kion vi opinias pri la donita etimologio de la nomo Babel (hebrea בָּבֶל (*balal*) = li konfuzis) ? Komparu ĝin kun la nuntempe ĝenerale akceptita etimologio de tiu nomo (akada *bāb 'ili* = pordego de Dio).
7. Kio estas laŭ vi la ĉefa rolo de tiaj etimologiaj indikoj, kiuj abundas en la teksto de la Biblio ?

Daŭrigota. Serĉu la sekvan parton !

La respondojn al la demandoj, ellaboritajn de la aŭtoro mem, **petu ĉe** redaktanto@edukado.net!